

Alfred Knapp,
Pensiulaj revoj

tradukita de Manfred Retzlaff

Revis en maturaj jaroj
ni pri la farotaj faroj:
Pensiuliĝinte ni
faros fine tion ĉi.

Legos ni la poezion,
studos la filozofion,
lernos plurajn lingvon krome,
kiam restos ni endome.

Fariĝinte pensiuloj
iĝas ni malagemuloj.
Bedaŭrinde malfortiĝas
ni, la cerbo kadukiĝas.

Iĝas ni nun maljunuloj,
eble ankaŭ plisaĝuloj.
Vanis ja revado nia.
Pensiuliĝo estas tia.²

*Traduko de la Germana poemo "Rentnerträume" de ALFRED KNAPP (*1933-03-18) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2002.*

MR-377-1 / Arg-789-1581 (2013-01-22 11:09:06)

Alfred Knapp estis redaktisto de la GEA-organo "Esperanto aktuell", de 1999 ĝis ?. Li loĝis en Bad Berka, Turingio, Germanio.

²aŭ eble:
Tia estas viv' pensia.